# LA KOMERCO

## Oficiala Bulteno de Komercista Esperanto-Unio

Centra Oficejo: Dresden/Radebeul, Friedrich-Auguststr. 4. Filioj kaj agentoj en 16 landoj

**La bulteno estas sendata al niaj agentoj kaj klientoj senpage; neklientoj kaj nekomercistoj povas aboni por RM 0.25 po numero. La bulteno aperas laŭbezone.**

Numero 14 + Eldonita en januaro 1931


# Oficiala rekono de Komercista Esperanto-Unio.

## La Komerca Ĉambro Dresden disponas al ni sian organizon.

**Al niaj legantoj.**

Esperanto kaj komerco estas du aferoj apartenantaj unu al la alia. Ĝis nun la komercisto relative malofte trovis la vojon al Esperanto. La kialo certe estas, ke la Esperantistoj ne aranĝis fakan propagandon, apogatan de praktikaj pruvoj, kaj ke aliflanke la komercistoj, ĉefe la eksportistoj, pro „longjara tradicio" opinias, ke oni povas fari negocojn nur, uzante naciajn lingvojn. La oficistoj en tiuj oficejoj eĉ estas fieraj, povante skribi leteron en unu aŭ kelkaj el tiuj lingvoj, eĉ, se tio okazas kun ofte multa peno kaj ofte tute fuŝe. Ekzistas pruvoj, ke en eksterlando alvenis ofertoj, eĉ presitaj, en tiom fuŝa lingvo, ke ili ridigis kaj sekve maltrovis la celon. Ofte estas esprimata en la ofertoj io tute alia ol estis dezirite. Jen ekzemplo: En Francujo estas disdonata franclingva katalogo de meblofabriko el Praha. Estas en ĝi uzataj por esprimi: mebloj por dormoĉambroj por sinjorinoj, fraŭlinoj kaj knabinetoj, la francaj vortoj „chambre à coucher pour femmes, filles et demi filles", (anstataŭ: dames, jeunes filles et fillettes) kio estas laŭvorte ĝusta, sed signifas laŭ francaj kutimo kaj moro: por virinaĉoj, publikulinoj kaj duonpublikulinoj".

Por montri al la komercistaro, ke ekzistas vojo malpli komplika, pli simpla, kostŝpara, antaŭ kelkaj jaroj estis fondata KEU, kiu celas: enkonduki Esperanton en komerco kaj industrio per la praktika aplikado de Esperanto en la komercado mem; t. e.: havigi mendojn en Esperanto donitajn kaj transdoni ilin al enlandaj fabrikoj samtempe kun la rekomendo, uzi Esperanton por reklamo kaj en la korespondado. Se komercisto vidas realan valoron de Esperanto, oni, kiel ni spertis, rapide estas preta, sekvi al la propono kaj fakte jam multaj firmoj enkondukis Esperanton kaj eldonis reklamon en Esperanto. La komenco estas farita! Pli kaj pli multaj eksterlandaj firmoj sin turnas al ni kaj al niaj agentejoj. La debito kreskas, donacoj de firmoj por peritaj mendoj ebligis al ni la eldonon de presita ofertbulteno „La Komerco". Nun ni devas pligrandigi la debiton, ĉar, ju pli multajn firmojn ni havas, des pli multajn klientojn kaj mendojn ni bezonas! Ni tial eldonis la nunan numeron en eldonnombro de 5000 super la kutima, sendante ĝin krom al niaj ĝisnunaj ricevantoj al ĉiuj delegitoj de UEA (kun kiu ni faris „kontrakton pri reciproka servo") kaj al la legantoj de „Heroldo".

Ni urĝe petas: donu nian bultenon al Esp.-komercistoj, sendu al ni ties adresojn, enmetu en vian gazeton raporton pri KEU, skribu al tieaj firmoj, kolektu mendojn! Igu, ke viaj grupanoj skribu al la firmoj postnomataj kaj petu pri Esp.-prospekto!

Volonte ni iel rekompencos vian helpon, krome vi havos ŝancon, gajni nian varbpremion.

Do, tuj al la laboro! Imagu, kian influon povus havi KEU, se ĝi fariĝus entrepreno uzata de la tutmonda komercistaro! El la profitoj povus esti subtenataj niaj ĉefaj organizaĵoj ktp.

**Premioj.** Ni donos al tiu, kiu havigos al ni mendon en valoro de: RM 2000.— premion de RM 20.—, de RM 5000.— RM 50.—, de RM 10 000 RM 100.— ktp. Ĉi tiu promeso validos ĝis 31. 12. 1931. Kiu gajnos?

## Ekonomiaj raportoj.

**Germanaj merkatoj.** La falo de la krudmaterialaj prezoj sur la mondmerkato bone influis la germanan bilancon eksterkomercan. Daŭris malkreski la importo, kaj kreskis la eksporto. Jen la ciferoj por Oktobro: importo 833.6 milionoj da RM, eksporto 1011.6 milionoj da RM (sen reparacivaroj). Por la 10 monatoj de 1930: importo 8977.7 milionoj da RM, eksporto 9598.6 milionoj da RM; rezultas en Oktobro eksportpluso de 178 milionoj da RM, kaj en Januaro/Oktobro 620.9 milionoj da RM.

Oni povas konstati, ke ree en la mondo estas serĉata la germana **bonkvalita** laboro kaj en tiaj produktoj la eksporto estas kontentiga. La enlanda merkato estas ankoraŭ tre malforta, la ega senlaboreco malbone influas la komercon. Pri sama stato raportas niaj agentoj en la diversaj landoj, ĉie krizo kaj stagnado. Oni esperas, ke la okazinta prezfalo de la krudmaterialoj kaj la ĉi-sekva prezmalaltiĝo de la finproduktoj refortigos la aĉetpovon kaj donos iniciaton al pliboniĝo.

Pro spacmanko ni ne presigas hodiaŭ niajn kutimajn ekonomiajn observojn, nek la detalajn ekonomiajn raportojn.

**Esperanta himno sur nerompebla gramofondisko.** Kiel raportite en N-ro 13, ni intencas eldoni kune kun UEA gramofondiskon, kiu surhavos la Esp.-himnon kaj kanton en Esperanto. Estas antaŭmenditaj proks. 100 diskoj; la fabriko eldonos la diskon, se estos antaŭmenditaj 500. Ni petas, nepre sendi sian antaŭmendon. La disko kostos afrankite RM 4.20.

## Teknikaj novaĵoj, atentindaj artikloj.

La Esp. firmo E. Hüttmann, Dresden, konstruis novaĵon tre gravan por ĉiu Röntgen-aparato. Temas pri inventaĵo, kiu ebligas la faron de 4 sinsekvaj radioskopiaj fotoj sen ŝanĝo de kaseto. En aŭtomatan falkaseton estas enmetataj 4 diafanaj kasetoj kun filmoj 9×12 cm. Post premo sur levilon, la unua kaseto enfalas en la rigardkampon por espozado. Per denova premo post espozado, ĝi falas en la kolektejon kaj la dua kaseto enfalas. Tio ripetiĝas 4-foje. Per tio estas ebligataj tute sinsekvaj fotografaĵoj ekz. de malsanaj korppartoj. Proponu tiun sensacian novaĵon nepre al viaj kuracistoj kaj malsanulejoj. Detaloj estos volonte donataj.

**Vaporkuirpotoj.** La rapidkuirpotoj estas plibonigataj en la direkto, ke estas enmetataj en la potojn specialaj enmetaĵoj el aluminio kaj per tio ebligata kuiri samtempe en unu poto diversajn manĝaĵojn (viandon, legomon, fruktojn) sen ke unu manĝaĵo akceptas la guston de la alia kunkuiraĵo. Oni ŝparas 50% da hejtaĵo. Vidu oferton!

**Silkaj naztukoj por sinjorinoj kun Esperanta stelo.** Fabriko liveras por s-inoj tre ĉarmajn modernajn naztuketojn el silko, kun kolora dentrando kaj verda stelo. La artiklo certe interesos la Esp.-grupojn. Vidu oferton.

**Zonoj por indiĝenoj.** Specialisto ofertas laveblajn zonojn multe eksportatajn al Hindujo, Kolombo, Straits Settlements, Ceylon, Siam, Batavia, Padang, Afriko. Interesatoj demandu specialoferton kaj specimenojn.

**Magiaj artikloj** estas ĉie demandataj kaj volonte aĉetataj. Ni ekrilatis al mondfama specialfabriko kaj tre rekomendas, oferti la objektojn. Katalogo estos volonte sendata.

**Fotografiloj.** La tendenco sur tiu kampo sekvas la celon, uzi malmultekostajn malgrandajn filmstriojn, kaj fortan objektivon. Tiuj du aferoj ebligas je samaj kostoj la fotografadon de pli multaj bildoj ol per kutima aparato. La treege precizaj bildoj estas facile pligrandigeblaj sen perdo de la precizeco. Ekzistas nun du tiaj aparatoj „LEICA" kaj „KOLIBRI", ambaŭ havas lumfortan objektivon: „Leica" (kun objektivo f : 2,5) kostas RM 260.—, „Kolibri" (kun objektivo f : 3,5) kostas RM 175.—. Ni certe atingos 10—15% da rabato por mendantoj.

**Por interligo de rimenoj** estas vendata tre taŭga rimenartiko, „Bulldog". Per ĝi estas facile kaj senpene kunligeblaj la rimenfinaĵoj. Specimen-aparato (1 aparato kun proks. 180 Bulldog-kroĉiloj en 3 grandoj) kostas nur RM 10.— afr. Demandu detalojn.

## Administraj sciigoj (por niaj agentoj).

Ni malfermis novan agentejon en Ploesti, Rumanujo, ni fermis agentejon Bern. Jen la adresoj de niaj agentejoj: (La firmo estas por ĉiuj: Komercista Esperanto-Unio, Agentejo [urbnomo].)

Addis Abeba, Etiopio, Boîte postale 185;
Baden (Svis.), Poŝtfako 100;
Cardiff (Britujo), 44 Robert Street, Cashays;
Hvammstanga (Islando);
Lodz (Polujo), Radwanska 6;
Osaka (Japanujo), (Bright Star Trading Co.), P. O. Box 20, Kawaguchi, Osaka;
Ploesti (Rum.), Str. Bărcănesti 1;
Recht (Persujo), Straje Gulŝen;
Ruse (Bulg.), Poŝtfako 85;
Sourabaya (Javo), Poŝtbox 81;
Utrecht (Nederl.), Hamburgerstr. 16;
Vraca (Bulg.), ul. Knjaĵevska 76.

Helpantoj:
Bilbao (Hisp.), S-ro Patricio Llano Serrano, Diputacion de Viscaya, Baracaldo;
Paris (Francujo), Esperanto et Commerce, 9 Rue d'Armaillé;
D. Nemseĉi, 24 Ŝeŝklan, Tabriz (Persujo).

Ni laŭdas la agentejon Lodz pro la bona maniero, laŭ kiu ĝi avizis per specialaj bonaspekte presitaj avizoj la fondon de la agentejo al la pola komercistaro kaj gazetaro.

Ni serĉas seriozajn diligentajn samideanojn (komercistojn aŭ oficistojn) en la landoj, en kiuj ni ne estas jam reprezentataj, por starigo de novaj agentejoj.

Ni petas niajn agentejojn, tuj transsendi niajn ofertojn al interesatoj. Se serioze estas farata tiu laboro, la sukceso ne forrestos. Al ĉiuj feliĉan, sukcesplenan 1931!

**Liverado de „La Komerco".** Ni kunsendis kun N-ro 13 al ĉiu ricevinto presitan karton petante, nepre resendi ĝin. Ni ripetas, ke ni nepre bezonas la karton kaj ni esperas, ke ĉiu resendos ĝin, por ke ni povu kompletigi nian sliparon.

**Al la ricevintoj de karto kun ruĝa streko en la marĝeno, ni ne plu sendos la bultenon, se ili ne petos pluan alsendon per resendo de la karto.**

### Novaj sukcesoj de KEU.

KEU Osaka atingis bonegan sukceson. Osaka instigis faman kemian entreprenon, surpresi sur skatolojn enhavantajn novajn kemiajn produktojn, la indikon pri la enhavo en Esperanto, kaj krome la fabriko donis al la produkto nom Esperantan nomon. Temas pri „Eklumo" rimedo kontraŭ lepro kaj pri kamforo-injektaĵo. La adreso de la fabriko estas: Osaka Sanrin Kemia Instituto, Osaka. Ni kore gratulas kaj ni petas, ke kuracistoj inter nia klientaro petu informojn aŭ specimenojn.

**La Komerca Ĉambro de Dresden** okupiĝis en kunsido pri KEU kaj decidis, **esprimante la plenan rekonon de la valoro de nia agado,** doni al ni sian **helpon, disponigante al ni materialon, adresojn ktp.** Ni ĝojas pri tiu valora atesto kaj konstatas, ke antaŭ kelkaj jaroj tia rekono ne estus estinta atingebla!

Jen listo de firmoj, ĝis nun varbitaj de KEU, al uzado de Esperanto.

(P = eldonis Esp. prospekton, Kat = Esp. katalogon, K = korespondas en Esperanto.)

Leowerke, Dresden-N., P.: „Chlorodont"-dentpasto, K.
A. H. A. Bergmann, Waldheim Sa., P.: ŝaŭmanta dentsapo „Rosodont", K.
Bombastuswerke, Freital bei Dresden, P.: sanigaĵoj, buŝakvo, dentpasto, K.
Zocher & Semmler, Leipzig, P.: muŝkatbendoj RANO.
Schäffels Albumfabrik, Leipzig, P.: albumoj por fotografaĵoj kaj kartoj, K.
Roth-Büchner, A. G., Berlin, P.: razklingoj, K.
Heine & Co. A. G., Leipzig, ofertilo: parfumesencoj, K.
Ernst Hüttmann, Dresden-A., Zwickaŭerstr., afiŝo: kabloŝuo GREIF, K.
Ernst Schurig, Dresden, Ludwig Hartmannstr. 37, P.: patentitaj novaj ŝtrumptenil̂oj, K.
Mende & Co., Dresden-N., P.: modernaj radio-riceviloj, K.
Sigurd-Gesellschaft m. b. H., Cassel, K.: bicikloj, K.
Mimosa A. G., Dresden, Esperantlingva surpreso sur fotoartiklaj pakumaĵoj, K.
Thorraduran Werke, Hüls b. Crefeld, P.: radiumo-nutrosalo, K.
Bankejo Gebr. Arnhold uzas Esp. sur diversaj formuloj, K.
Mönchol-Werke, Esperanto-Fako, Dresden-Loschwitz, Ludwig Richterstr. 6, P.: pri „Mönchol" nevenena rimedo kontraŭ galŝtonoj, K.
Elektrizitäts- Bau- u. Handels-Kommandit-Gesellschaft, Zwickau, P.: pri elektra porcelana kafkruĉo, K.
Johannes Kuswa, Radebeul, P.: pri plektitaj tapiŝoj, K.
D-ro A. Wanderer S. A., Bern, P.: pri Ovomaltine, K.
Osaka Sanrin Kemia Instituto, Osaka, Indiko pri enhavo sur pormedikametaj skatoloj estas farata en Esperanto, krome du medikamentoj havas Esperantan nomon.

La fabriko de la fontanplumingo „Mont Blanc", „Plenio" Hamburg, decidis, presigi estonte la uzadinstrukciojn ankaŭ en Esperanto. La fabriko de la nerompeblaj gramofondiskoj eldonos estonte sian reklamon ankaŭ kun Esperanto-teksto.

Aliaj al ni konataj Esperanto-firmoj.

Günther Wagner, Hannover kaj Vieno, eldonis P. pri oficejaj artikloj.
Bankejo Dr. Vogtsche Bank, Stuttgart, K. kaj anoncas Esperante.
Hungara Ĝenerala Kreditbanko (Magyar Altalanos Hitelbank), Budapest, P.: bankservoj.

## Niaj ofertoj.

La prezoj estas la originalaj prezoj de la liverantoj, ili estas nedevigaj por ni. Por kovri niaj elspezojn, ni — respektive niaj agentoj — alkalkulos makleraĵon de 1‰ ĝis kelkaj procentoj, laŭ grando de la mendo.

La hodiaŭaj ofertoj nur prezentas parton el multo, pri kiu ni disponas. Ni atentigas, ke ni povos havigi rapide oferton pri ĉia varo, sed, ni petas, direkti al ni nur demandon, se vi serioze interesiĝas pri varo. Kelkaj ofertoj estas ripetataj el antaŭaj numeroj.

Oferto N-ro 339. **Plektitaj tapiŝoj el lanfelto** (faritaj el defalproduktoj de la ĉapelindustrio, tial treege malkaraj). Antaŭmetaĵo ĉirk. 50×90 cm RM 4.25 la paro, 54×100 cm RM 5.55

la paro. Irtapiŝoj, aŭtomobilmatoj RM 5.80 la kvadratmetro, loko fabriko.

Oferto N-ro 501. **Patentitaj paperjaluzioj,** bonega ŝirmilo kontraŭ suno, taŭga speciale por varmegaj landoj. Prezo: Svedaj Kronoj 1.40 por unu, larĝo: 120 cm, longo: 225 cm. Aliaj grandoj proporcie. Fob Wasa, Finnlando.

Oferto N-ro 310. **Nerompeblaj, flekseblaj gramofondiskoj.** Prezo ĝis 50 diskoj po RM 2.75, 50—100 po RM 2.45, 500 po RM 2.40, 1000 po RM 2.30, loko Dresden ekskl. pakumaĵo. Specialaj stiftoj 1000 RM 2.75. Granda repertuaro, ankaŭ diskoj en la ĉefaj naciaj lingvoj.

Oferto N-ro 348. **Fotografaj filmoj „PERUTZ".** Rulfilmo 609 cm, ortokromata, senhaloa, RM 1.35; Filmpako 609 cm RM 3.10. Aliaj grandoj proporcie.

Oferto N-ro 308. **Poroza, higiena lanŝtofo,** havanta la specialan econ, ke la teksmaŝoj ne disiĝas, se oni entranĉas ornamojn. Prezo: Francaj Frankoj 40 la metro por larĝo de 100 cm. Ĉe aĉetoj de pli ol 50 metroj, Fr. Frankoj 34.—. Loko Pariza fabriko.

Oferto N-ro 229. **Ŝtrumpoj.** Por sinjorinoj, el mako; la dekduo $ 1.90—3.15, el silkvualaĵo $ 3.15—4.25. Por sinjoroj, el mako $ 1.35—1.90, silke tegita vualaĵo kaj artefarita silko, $ 2.85—3.80 loko germana fabriko ekskl. pakumaĵo.

Oferto N-ro 168. **Razklingo „Espero"** 1000 RM 42.— loko germana fabriko, 100 RM 7.— afrankite. Razklingoj de Roth-Büchner laŭ Esperanta oferto, sendota volonte.

Oferto N-ro 205. **Modernaj sportŝaloj el pura lano.** Po $ 0.37 ĝis 0.63 laŭ grando kaj pezo. Vojaĝkovraĵoj plejbonkvalitaj. Interesatoj postulu detalan oferton kun specimentranĉaĵoj.

Oferto N-ro 211. **Radio-aparatoj de la fabriko MENDE.** Plej altkvalitaj aparatoj, plej moderna konekto kun ŝirmgrilaj lampoj. Modelo 100 (3-lampa) RM 190.—. Modelo 50 (4-lampa) RM 320.— (prezo sen la lampoj) rabato 35%. Loko Dresden. Modelo 25 (3-lampa) kun la novaj „Arcotron" Telefunken-baston-lampoj, RM 85.—. — Ĉiuj aparatoj estas konstruitaj por kontaktigo kun la elektra drataro (senbateria funkcio). Ĉe mendoj indiku la voltnombron de via elektra kurento kaj ĉu ĝi estas kontinua aŭ alterna.

Oferto N-ro 217. **Krajonoj** de plej bona kvalito. Postulu de ni oferton pri „FABER"-krajonoj. Krome ni ofertas malkarajn krajonojn, 144 por RM 1.20 loko fabriko kaj pli karajn.

Oferto N-ro 227. **Ŝuoj** ĉiuspecaj. Interesatoj postulu katalogon. En okazo de multaj demandoj kaj mendoj la firmo eldonos Esp.-katalogon.

Oferto N-ro 197. **Eburaj bilardpilkoj** kaj ĉiuj bilardakcesoraĵoj. Postulu katalogon. Rabato 20%.

Oferto N-ro 100. **Kudromaŝinoj.** Al interesatoj ni sendos bildojn kaj prezojn post demando.

Oferto N-ro 219. **Elegantaj subvestaĵoj por sinjorinoj.** Kotonaj „Atlas"-kvalitoj, englitkalsonetoj, grandoj 42—48, kvalito 4133 RM 21.40; kvalito 162 RM 16.50. Ĉemizo-kalsonetoj el viskoza „Charmeuse", marko „Checoline" RM 25.50, 53.60 kaj 34.40. El viskoza „Milanese" marko „Checonese" RM 31.80. Rondteksilaj trikotaĵoj „Selilose", speciale elastaj kaj molaj, englitkalsonetoj RM 13.85—23.35, subjupoj elegantaj kun puntoj, RM 21.85—23.35; prezoj por dekduo. Loko germana fabriko. Prezoj por grandoj 42—48 (englitkalsonetoj) 95/42—110/48 (jupoj).

Oferto N-ro 193. **Malkaraj razpenikoj.** Prezoj por dekduo: N-ro 1730 RM 3.30. N-ro 1700/1hw RM 2.—, N-ro 1701/2 RM 3.20, N-ro 1724/1 RM 4.50 minus 20% rabato, afr. germana haveno. Minimuma kvanto 144 penikoj de sama kvalito. Livereblaj estas ankaŭ pli multkostaj penikoj, interesatoj postulu katalogon. 6 specimenoj por RM 2.—.

Oferto N-ro 200. **Fortepianoj** de bonfama fabriko. RM 745.— loko germ. fabriko.

Oferto N-ro 201. **Germanaj blankaj vinoj** de la „Mosel"-vinregiono. Botelo RM 1.50—7.—. Por grandaj kvantoj en bareloj: specialprezoj. Reprezentantoj serĉataj.

Oferto N-ro 194. **Parfumesencoj** (florgutoj). Skatolo enhavanta 2×2½oz Heiko-jasmeno sh. 3/10, „Datura", sh. 6/6, „Tuberose" sh. 7/2, Heikodor-narciso sh. 2/2, „Chypre" sh. 5/-. Interesatoj postulu specimenojn.

Oferto N-ro 204. **Ĉiuspecaj muzikinstrumentoj.** Postulu katalogon, rabato 40%.

Oferto 195. **Nebruligeblaj farboj.** (Farboj, malebligantaj bruladon de objektoj, pentrumitaj per ili) 100 kg RM 100.— fluidaĵo por la preparado, 100 kg RM 105.—. „Napatol" por nebruligi kurtenojn, ŝtofojn, 100 kg RM 75.—. Prezoj validaj por mendo de minimume 1 barelo de 200/300 kg. Fob Hamburg.

Oferto N-ro . **Sakarino,** 550-oble pli dolĉa ol sukero, solvebla en alkoholo, hol. florenoj 8.04 por kilogramo.

Oferto N-ro 519. **Vaporkuirpoto „Frank-Umbach"** komplete kun diversaj enmetaĵoj, 3½-litra poto RM 24.—, 5-litra RM 26.—, 7-litra RM 31.—, rabato 25—30% laŭ la kvanto.

Oferto N-ro 520. **Magiaj artikloj.** Interesatoj postulu katalogon, rabato 5%.

Oferto N-ro 521. **Kolora, glazuriga karbolineo** por ligno, lumrezista, temperaturrezista, konserviga. Prezo RM 1.75 la kilogramo ĉe aĉeto de 100 kg, afrankite germana limo.

Oferto N-ro 515. **Ornamnaztukoj** el ĉina krepo kun Esperanto-stelo. Dekduo RM 6.50 loko fabriko. Haveblaj ankaŭ en mako kaj batisto. Tablokovraĵoj kun Esp. desegno 36×25 cm RM 1.70. Loko fabriko.

Oferto N-ro 522. **Kanabŝnuroj,** prezo RM 3.57—6.93 la kg. Pri aliaj ŝnur-fabrikaĵoj demandu specialoferton.

Oferto N-ro 517. **Laveblaj zonoj,** prezo laŭ farmaniero kaj aranĝo RM 2.— ĝis RM 5.— kaj pli la dekduo, neta kontanta pago, inkl. marsekura pakumo, fob Hamburg, asortite en longoj 32—28" la dekduo. Ĉiu zono en papersaketo, 12 en verda kartono.

Oferto N-ro 516. **SPIE-HA patentitaj ŝtrumpteniloj** (malebligas falon de maŝoj). N-ro 111 tenilo por sinjorinoj kun buko por korset-ventro-bandaĝoj aŭ zonoj, dekduo da paroj RM 7.80, N-ro 555 por sinjoroj RM 7.80 la dekduo. Haveblaj en tre diversaj farmanieroj, ankaŭ luksaj, demandu detalan oferton kun specimenoj.

Oferto N-ro 514. **Nova tre ĉarma ludilo „Kato kun pilko".** Streĉite la kato faras tute samajn movojn kiel kato kaptanta pilkon. Prezo RM 9.— la dekduo, loko fabriko.

Oferto N-ro 513. **Tre amuza ludilo: simio,** kiu faras, streĉite, transkapiĝojn. RM 5.90 la dekduo, loko.

Oferto N-ro 356. **Malgrandaj razaparatoj,** kunmeteblaj, „Piccolo I" RM 1.80, „Piccolo IV" RM 1.— la peco minus 50% rabato, loko fabriko.

Oferto N-ro 355. **Ĉokoladaj figuroj** (tre ŝatataj en multaj landoj, speciale en Ameriko) marionetoj, enpakitaj en staniolo, 12 en kartono. 1 figuro, pezanta 15 gramojn, RM 0.0126 fob germana haveno.

---

**Nigra listo.** Ni a v e r t a s kontraŭ:

S-ro H. Fischer-Galati, Prez. de la Rum. Esp. Societo, resp. kontraŭ ties firmo Max Fischer Succ., Bukureŝto, Calea Victoriei,

S-ro Zacharie Masteran, Magasin de Nouveauté, Bander Pahlevi, Persujo,

Tiuj sinjoroj ricevis varojn kaj nek pagis, nek resendis ilin, malgraŭ ofta admono. Samideanoj! Konigu tiujn firmojn al viaj komercaj ĉambroj, por ke ili estu metataj sur la liston de nefidindaj firmoj, kaj skribu al ili, esprimante vian malkonsenton. Ni devas purigi Esperantujon de personoj, malutilantaj al nia movado. Montru solidarecon!


---

**Manuskripto kontrolita de Karl Minor, L. K., Hamburg.**

## Ĉu vi bezonas Esperantaĵojn?

Se jes, bonvolu postuli nian Esperanto-Katalogon, kiun ni sendos senpage. Ni povas liveri Esperanto-librojn ĉiuspecajn el nia propra kaj ankaŭ el aliaj eldonejoj.

Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek
G. m. b. H., Berlin SW 61, Wilhelmstraße 5




**JOHANN FABER**

*„APOLLO" kaj ĝiaj tri „subtenantoj":*
*● nerompemo ● kovremo ● adheremo*

## ATENTU

KIU VOLAS
AŬ DEZIRAS
VENDI ION
EN BELGUJO

faru proponojn al v. d. Bulcke,
Gent, Geo Spinnerstrato 2 (Belgujo)

## Schloßmann & Scheffler

ekspedistoj

Dresden, Rosenstraße 26
Telefono 25646

Hamburg, Ferdinandstr. 5
fondita en 1872

Internaciaj transportoj
Propraj unuarangaj
magazenoj

*La nerompebla gramofondisko*

## *Phonycord*

*kolora,*
*fleksebla,*
*akvorezista,*
*varmegrezista*

*Komercista Esp. - Unio*
*Dresden - Radebeul*
*kaj ĝiaj agentejoj*




## Sinjorinoj!

Ĉu vi jam uzas la ĉie enkondukitan novan

ŝtrumptenilon

## „SPIE-HA"

Ĝi ne faligas la maŝojn, ne disŝiras la ŝtrumpon, ne rustiĝas.

Reprezentantoj,
aĉetantaj por propra fakturo, serĉataj.

## Bambuaj manĝiloj

**bonega novaĵo por piknikmanĝilaro.**
**Bambuaj forkoj kaj tranĉiloj, bambuaj kuleroj por supo, kafo aŭ teo kaj kuleretoj.**

Specimenaroj konsistantaj el 10 diversgrandaj forkoj, tranĉiloj kaj kuleroj estos sendataj kun eksportprezoj al tiu, kiu sendos sfk. 1.50 aŭ japanan monon yen 0.60. Ankaŭ estas haveblaj ĉiuspecaj bambuaĵoj, ekzemple stangoj por fiŝkaptado, skiaj kaj promenaj bastonoj, teniloj por ombreloj kaj bastonoj, diversformaj korboj. Belartaĵoj kaj pupoj bambuaj ktp. Informoj pri bambuaĵoj estas volonte donataj.


**Bright Star Trading Co (KEU agentejo Osaka)**
**P. O. Box No 20 Kawaguchi, Osaka, Japanujo.**

## Obla Falkaseto

'Presser-Hüttmann'
por celataj espozoj.

Konstrua kunlaboro: Instituto Holzknecht.

Gravega novaĵo por Röntgen-specialistoj



Avantaĝoj: Tuja preteco ◆ Laŭvola nombro da bildoj (ĝis 4) ◆ Espozoj kun dozebla premo (kompresio) ◆ Espozoj sen kompresio ◆ Filmo proksimege ĉe la objekto, plej bona bildigo, plej ega ekzakteco ◆ Videbleco de la bildo dum la espozado, helpe de travidebla kaseto. ◆ Plej granda ŝparo — filmoj 9:12 cm ◆ Plej simpla manipulado ◆ Solida, stabila konstrukcio ◆ Aluminio.

## Niaj presaĵoj

estas unuakvalitaj laŭ moderna aranĝo, klara preso kaj bona papero. Nia specialaĵoj estas Esperanto-presaĵoj.
Petu senkostan oferton!

**PRESEJO**
**de „Heroldo de Esperanto"**
Köln, Brüsseler Straße 94, Germanujo.


PRESO: HEROLDO DE ESPERANTO, KÖLN